



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 4-a de Majo 2020 (ZOOM)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.

Gastoj (partatemp): Jehudit Epŝtein, Doron Modan, Renato Corsetti, Neil Blonstein, Ali, Dieter Rooke, A. Pacholski, Takechi kaj aliaj.

Protokolo de la pasinta kunsido troveblas en nia retejo.

1. Raportoj:

a) Amri transdonas de Mikaelo: IE-169 estas preta, post la provlegoj.

b) Aktualajo: Ĉu la ĝusta esprimo en E-o estas “kronviruso” aŭ “koronaviruso”? (Amri, Renato, Jehoŝua) – la ĝusta formo estas: **koronaviruso!**

c) Amos (telefone): Ĉu ni povas gastigi en gimnazio Herzlia (eble senpage)?

2. Ĉu oficejo – aŭ magazeno? (Ŝlomo)

a) La propono kiun ricevis Ŝlomo: ĉ. 6.5 m² nete, prezo bona – sed la komuna (=kunvena) ĉambro estas ĉ. 10 m² – ne taŭgas por niaj kunvenoj. Do – la propono forfalis. Ni ne devas urĝi!

La Societ-registraro kontentigis per niaj klopodoj. La makleristino povas informi nin. Ankaŭ la retejo “Yad2” estas fonto de informoj. Ni daŭrigas informiĝi.

3. Ni – kaj Bejt-WIZO (Jehoŝua)

Laŭ informoj de la direktoro, s-ro Efrati, neniu mortis pro koronaviruso ĉe ili. Eble li malfermos por kunvenoj en Junio. Endas trakti kun li pri redukto de la neŭzitaj sed pagitaj 3 kunventagoj!

4. Dratverejo (Ŝlomo)

Amos estas en kontakto kun la luantoj. Ili diris al li, ke ili ŝparis monon por Marto kaj Aprilo. Amos devus veturi por ricevi la kontantan monon – sed li ne povis veturi ĝis nun pro diversaj kaŭzoj. Laŭ la lasta decido: dum ili pagadas – ni ne progresigas paŝojn pri evikcio, sed tiu ĉi minaco devas resti super ilia kapo.

5. Financoj (Ŝlomo)

La tabelo de buĝeto kontraŭ elspezoj estis projekciita, videbla al ĉiuj. Ni havas deficiton: 146% da elspezoj kontraŭ la akceptita buĝeto.

6. IK-21 - prokrastita (Amri)

Amri informis la eksterlandajn partoprenantojn, ke ili povas ricevi la antaŭpagon (50 eŭroj) minus 15 eŭroj ĝirkosto. Aŭ – lasi ĝin ĉe ELI por la venontjara IK. Plejparte ili NE petis repagon. Propono: al la israelanoj Ŝlomo povas resendi sub la samaj kondiĉoj. Voĉdono: *unuanime akceptita!*

2/...

**7. Nia lingvo – ne nur dum kunsidoj** (Jehoŝua)

La estraranoj diskutas koresponde inter si pri oficialaj temoj de ELI – plejmulte hebree. Ĉar nia Vicprezidanto Mikaelo ne ellernis la hebrean ĝis diskuta nivelo, ni devas re-ekuzi E-on! **Propono:** ni klopodu kiom eble plej multe uzi E-on (krom multipaĝaj aldonoj kiel kontraktoj ktp). *Unuanime konsentite kaj promesite!*

8. Landa Kunveno – *eble en julio, ĉar supozeble la homoj estos hejme, ne eksterlande.*

La venonta kunsido: 8-a de Junio 2020, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi